

## Intervjuo kun Claude Piron (2), tradukado de kantoj en Esperanton.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 728, 1977 septembro 21, 23 kaj 24.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-13/SRI-1977-13-B-8-102-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-la-verkisto-kaj-poeto-Claude-Piron-2.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond. Ni aŭdigos al vi hodiaŭ la duan intervjuon, kiun ni faris kun sinjoro Claude Piron, verkisto kaj poeto, pri la temo : tradukado de kantoj en esperanto.

Kio estas la ĉefa problemo en la tradukado de kantoj nun ?

CP.- Nu, traduki kanton estas preskaŭ nefarebla tasko. Ĉar necesas respekti en unu lingvo ritmon kaj meloditipon kreitaj por alia.

Cl.- Ekzemple, rilate al la ritmo, kion tio signifas ?

CP.- Nu, ĉiu lingvo havas sian propran ritmon kaj tiu ritmo estas determinita de aro da faktoroj, kiel ekzemple akcento, ekzisto de longaj kaj mallongaj vokaloj, ofteco de unusilabaj vortoj aŭ meza silabnombro de vortoj ktp. Ekzemple la granda diferenco inter la ritmo de la angla kaj de la franca troviĝas en tio, ke en la angla estas multego da unusilabaj vortoj kaj tre forta akcento. Dum en la franca apenaŭ ekzistas akcento kaj la akcento estas fraza aŭ frazparta, ne vorta. Krome ĝi estas ĉiam sur la lasta silabo. Unusilabaj vortoj en la franca ne estas tiel multaj, kiel en la angla. Kaj por preni alian ekzemplon, la diferenco inter la ritmoj de la itala kaj de la hispana devenas de la fakto, ke la hispana havas pli da vortoj kun akcento sur la lasta silabo ol la itala. Ekzemple ĉiuj infinitivoj. Hispane oni diras 'amar', kie itale oni diras 'amare'. Kaj ankaŭ ĉe multaj substantivoj. Hispane 'alimentacion', kie itale 'alimentazione'. Kaj ankaŭ la fakto ke en la itala multaj vokaloj estas longaj. Dum ĉiuj vokaloj de la hispana estas mallongaj. Kaj la poeziaj formoj ekzistantaj en iu kulturo nature dependas de la normala ritmo de la lingvo. La franca ekzemple absolute ne povus havi poezion kun forte prononcata ritmo kiel la angla, ĉar ĝi tutsimple ne havas vortojn kun tiel forta akcento. Kaj la hispana ne povus havi subtilan muzikan ritmon kun alterno de longaj kaj mallongaj silaboj, kiel la hungara aŭ la ĉeĥa, aŭ la slovaka, ĉar la tuta koncepto pri longa vokalo forestas de ĝia fonetika sistemo.

Cl.- Kiel do faras ĝenerale la kantotradukistoj ?

CP.- Ha, ili faras nenion, aŭ malmulte, aŭ agas aĉe. Ĝenerale simple ne temas pri traduko. Traduki kanton respektante kaj la ritmon kaj la sencon estas neeble en la plimulto de la lingvoj. Tiel la tradukistoj rezignas pri unu el la aspektoj. Ili adaptas iujn ajn vortojn al la ritmo, aŭ ili pli-malpli provas respekti la originalan sencon.

Cl.- Ĉu tio ŝanĝas la melodion ?

CP.- Kelkfoje jes. Fakte, ofte, se tradukanto de kantoj volas esti fidela, li devas aldoni aŭ forpreni muziknoton. Kaj se tio ne ŝanĝas la melodion mem, ĝi almenaŭ ofte ŝanĝas la ritmon de la kanto.

Cl.- Kiel situas la diversaj lingvoj koncerne la eblecojn de fidela kanto-tradukado ?

CP.- Ili estas tre malsamaj. Ekzemple la anglan ĝenas la rigideco de la vortordo. Kaj la troa mallongeco de la ordinarlingvaj vortoj. La germanan ĝenas la rigida frazkonstruo. La franca prezentas la saman malavantaĝon kun la kroma, ke ĝiaj vortoj estas ĝenerale pli longaj. Kaj ankaŭ ke la devigo precizigi ĉiujn rilatojn inter la vortoj trudas la uzon de prepozicioj, kiuj

kun la necesaj artikoloj ege pliigas la nombron de nemalhaveblaj silaboj. La hispana, portugala kaj itala havas multe pli da libereco en la vortordo ol la franca. Sed tiu bonaĵo estas bedaŭrinde kompencita de la plilongeco de la meza vorto. Ekzemple por traduki la anglan vorton 'song' la franca havas 'chant', unu solan silabon, dum la aliaj latinidaj lingvoj, escepte de la rumana, havas unu silabon pli : 'kanto', ..., ..., kun 'o', kiun oni ne rajtas elizii.

Cl.- Kaj la slavaj lingvoj ?

CP.- La rusa kaj la aliaj slavaj lingvoj similas pri ritmaj problemoj en la latinidaj. La vortoj ofte estas multsilabaj, kaj ankaŭ pro la deklinaciaj kazoj, kiuj ofte devigas enmeti unu aŭ du silabojn al la radika vorto. Sed estas ankaŭ variece koncerne la akcenton. La pola kaj ĉeĥa kaj slovaka havas fiksan akcenton. Sed tio ne tre ĝenas koncerne la ritmon pro la ebleco loki la vortojn en la frazo kun libereco tute simila al tiu de esperanto. En la rusa la variece de la akcentloko eĉ pli fleksebligas la ritmon. Sed bedaŭrinde tio ne vere kompencas la malavantaĝon, kiun prezentas la trolongeco de la vorto, ĉefe kiam temas pri traduko el lingvo kiel la angla.

Cl.- Ĉu la situacio estas malsama kun esperanto ?

CP.- Estas tute malsama. Fakte, se oni rigardas la tutan bildon pri lingvoj, oni konstatas, ke esperanto aperas preskaŭ senlime fleksebla. La fakton ke la vortoj en ĝi estas foj-foje relative longaj kompencas du faktoroj. La ebleco uzi elizion kaj la ebleco uzi sintezan formon anstataŭ analiza. Ekzemple diri 'Mi trajnis kongresen' anstataŭ 'Mi veturis per trajno al la kongreso'. Kaj kontraste kun tio, kion oni observas en la slavaj lingvoj, tiu uzo de sintezaj formoj ne postulas la aldonon de multaj silaboj.

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos tiun ĉi intervjujserion pri la tradukado de kantoj kun la poeto Claude Piron. Vi aŭdis el Svislando Claude Gacond kaj Claude Piron. Ĝis reaŭdo!

*(muziko)*